

LA PROGRESO

CEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ

Aperas monate. Jara abono Kĉ 20.—, eksterlande Kĉ 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kĉ 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Jos. Brožk, Plzeň, Prokopova tř. 9. — Konto de la Poŝta ŝparkaso ĉs. n-ro 5203, aŭstria n-ro 169.352. — Telefono 718/VIII. La manuskriptojn oni ne resendas.

IRU TUJ!

en la poŝtoficejon kaj sendu Vian reabonon al »La Progreso«, se Vi ankoraŭ tion ne faris! Memoru, ke la devo de ĉiu esperantisto estas subteni esp. preson, kaj se Vi ne abonas ĝustatempe, tiam Vi ne estas subtenanto, sed ĝia — parazito. Tial

NE FORGESU!

PRI NIA PROPAGANDO.

Se ni atentus la laboron de niaj samideanoj kaj de esp. societoj, ni trovas inter ili la plej diversajn metodojn de propagando. Kelkaj metodoj rapide akcelas la disvastigon de nia lingvo, kelkaj estas malpli efikaj kaj kelkaj eĉ restas tute sen efiko.

Decidanite pri iu propagando, ni ĉiam konsideru, ke nur serioza entrepreno povas utili al ni, kontraŭe, afero pripensita nedetale ordinare malutilas. Insigno, kiun ni portas en la butonruo aŭ en kravato siavice ankaŭ estas propagando, sed malbone propagandas Esperanton, kiu superflue ornamas sin per esp. steloj. Dum niaj kongresoj ofte oni trovas personojn, kiuj aspektas kiel vivantaj reklamiloj: sur sia ĉapelo, en butonruo, sur la poŝtuko en brustpoŝo, sur kravato, en manuoj, ĉie oni vidas stelojn kaj oni ne povas miri, se ili estas rigardataj de neesperantistoj kun mokrido. Similan manieron de propagando oni devas rifuzi, ĉar ni devas reprezenti esperantismon per nia seriozeco. Ankaŭ ofte okazas, ke du personoj, kiuj apenaŭ ellernis esp. gramatikon penas per sia laŭta esp. »interparolado« atentigi la publikon pri sia scio. Sed kiel aspektas ilia esperanto? Ĉu oni kredas, ke fremdufo trovos plaĉon en ilia balbutado? Tute ne, kontraŭe, li fariĝas malamiko de nia lingvo!

Plej efike povas propagandi Esperanton niaj societoj. Tial devo de ĉiu samideano estas subteni la societojn. Kontraŭe, la societoj eduku bonajn esperantistojn kaj tertajn propagandistojn de nia afero. Antaŭ ĉiu esp. kurso oni atentigu la publikajn rondojn pri la

graveco de Esp. per kelkaj notoj en la lokaj gazetoj. Sed oni ne forgesu, ke la redaktoroj ne volonte enpresas la artikolojn, kiuj direkte celas propagandon. Tial la notoj enhavu simplajn faktojn el nia movado. Por niaj societoj jen estos speciale utila la »Propaganda sekcio de Ĉeĥoslovaka asocio esperantista«, kiu senpage sendas serioze redaktitajn gazetnotojn.*) Ili estas skribitaj maŝine kaj estas sole necese forporti aŭ forsendi ilin en la redaktejon. Se la publiko ofte legas pri Esp., tiam la kursoj estas pli nombre vizitataj. Tiun fakton la aranĝantoj de la kursoj neniam forgesu!

Nun alvenis la sezono, en kiu silentiĝas la societa laboro. La angloj nomas ĝin tre trafe »the silly season« (la stulta sezono), sed por ni ĝi devas signifi tempom de preparo por aŭtuna propagando. En la komenco de la lerneja jaro devas komenci nia vigla laboro. Ju pli bone ni ĝin preparos, des pli sukcesa ĝi estos por nia movado!

Kiel ni propagandos en aŭtuno? Preskaŭ en ĉiu vilaĝo aŭ turbo ekzistas kleriga societo, al kiu ofte mankas konvenaj temoj por ĝia laboro. Kaj jen niaj propagandistoj: societoj eĉ privatuloj povas trovi fruktodonan kampon de sia poresperanta penado. Ili anomeu (post la libertempo) al ĉiuj klerigaj societoj de sia loko, ke ili sendos senpagan paroladiston, se ili aranĝos por siaj membroj paroladon pri la lingvo internacia. Sendube granda parto de tiuj societoj volonte uzos ĉi tiun okazon, kiu aliflanke utilos al nia movado. Jen la oratoro povas instigi la aŭskultantojn al lernado de Esperanto kaj se estos sufiĉe nombraj aliĝintoj, li povos aranĝi por ili specialan kurson, kies aranĝadon povas premi sur sin la rilata kleriga societo.

Nia redakcio volonte helpas en tiu ĉi metodo de propagando. Ĝi pruntoj por tiu celo konvene kunmetitan prelegon (paroladon) »Pri la lingvo internacia« al ĉiu, kiu petos ĝian sendon. La oratoro havos tiamaniere la-

*) Adreso: S-o Rud. Hromada, Praha VII., Sochařská 333.

boron tre facilan: li simple tralegos la paroladon antaŭ la aŭskultantoj. La konsilojn, kiel paroli kaj kiel sin prepari por la parolado ni ankaŭ volonte donos al ĉiu oratoro-komencanto. Unusolan ni petas: kiu volas tiamaniere kunlabori en la propagando, anoncu sin al ni kiel eble baldaŭ, por ke ni havu sufiĉan tempon prepari la necesan nombron da kopioj de la parolado. Eble ne estas necese atentigi, ke la parolado de ni pruntata estos skribita en la lingvo ĉeĥa.

Ni esperas, ke multaj samideanoj uzos ĉi tiun okazon por efika propagando.

ooo

ALOIS JIRÁSEK*):

EL „TEMNO“.

La morgaŭon, vendrede, adiaŭis la sankta misio al Dobruška. Post solena sonorigado per ĉiuj sonoriloj en malfrua posttagmezo havis pastro Mateřovský sian predikon sur la urbplaco. Ĝi estis la lasta, sed ne la fermo de la tuta sestaga agado de jezuitoj el Hradec.

*) La aŭtoro estas la plej fama ĉeĥa verkisto de historiaj romanoj. En sia romano »Temno« (»Mal-lumo«) li priskribas la staton ekregintan en la ĉeĥaj landoj post la ĉeĥa malvenko sur Blanka Monto (j. 1620). Ni represas fragmenton el la romano, traktantan pri la sorto de ĉeĥa libro. — Red. rim.

FELIETONO

LIBERTEMPO.

Kiom da sorĉo por la infano vizitanta lernejon enhavas tiu ĉi vorto! Certe ankaŭ ni, kiuj jam de longe forlasis la lernejon por ĉiam, ankoraŭ nun rememoras la dolĉan tempon de nia infana libertempo, kiu por ni estis tempo de vera senzorgeco kaj libereco.

Dum la daŭro de la milito la infanoj havis libertempon ne enviindan: ili devis stari en »frontoj« dum longaj horoj kaj atendi la eldonadon de manĝaĵoj. Sed nun, fine, alvenis tempo pli feliĉa kaj ni denove povas satmanĝi sen longedaŭra atendado antaŭ la magazenoj de manĝaĵoj. Kaj tial al la infanoj revenis la perdita libertempa senzorgeco.

Mi volonte observas la infanojn dum ilia libertempo kaj ofte komparas la agadon ilian kun la nia. Eble tie ĉi ne ekzistas diferenco.

Prezidanto de la loka societo »Komenský« (Comenius) informis min pri la alveno de la ĉeĥaj infanoj vizitantaj la lernejojn en Vieno, kiuj estos dum la libertempo gastigataj ĉe diversaj familioj en nia urbo. Mi iris en la stacidomon por vidi ilian alvenon, kaj vere mi ne havas kaŭzon bedaŭri, ke mi tion faris. Kiam alruliĝis en la stacidomon vagonaro ornamita per niaj naciaj flagoj, elsaltis el la vagonoj la malgrandaŭ migrantoj. Ili ĉiuj havis sur sia brusto alpinglitan paperfolion kun la adreso de la gastigonto. Tiel ili aspektis kiel paketoj transdonitaj al la poŝto por transporto. En la brakoj aŭ sur sia dorso ili portis skatolon aŭ saketon kun sia tolaĵo. Ili estis mirigitaj pro granda

La fermo estis okazonta post la prediko sur tombejo.

Tie sur libera loko malantaŭ la preĝejo preparis la tombisto ŝtiparon el seka ligno. Ambaŭ jezuitaj famuloj apud ĝi elprenadis el tri sakoj librojn pligrandparte malnovajn, sed ankaŭ preskaŭ novajn, ĉefe el Zittau ĉi tien transportitajn, ĉiujn tie ĉi forprenitajn. Inter ili estis ankaŭ tiuj, kiujn pastro Koniáš**) alveturigis el Oĉelice, kiuj estis forprenitaj en Skalka kaj aliaj, kiujn la homoj alportis post predikoj, ĉefe de Koniáš, memvole en la dekanejon aŭ ilin sekrete tien sendis.

Ankaŭ tri libroj de maljuna Lemfeld, lia tuta biblioteko, venis inter tiujn kondamnitajn al forbruligo. La maljunulo mem ne fordonis ilin, ne anoncis ilin, eĉ sekrete li ilin ne sendis, pastro Koniáš forrabis ilin al li. Postsignon de ili li trovis en Skalka. Inter la libroj forprenitaj al Machovec estis unu kun subskriboj kaj enskriboj de la familio de Georgo Lemfeld, kiu Machovec prunteprenis. Koniáš tuj, kiam li revenis el Skalka, demandis en la dekanejo, ĉu oni konas iun de tiu nomo.

Li aŭdis pri la maljuna burĝo, ke nenio estas kontraŭ li, en la preĝejo li ne estadis ofte, ĉar li estas de alta aĝo kaj malsanema, sed al la paciĝo kun dio li venas kiel necese.

**) Koniáš, jezuito, kiu plej multe distingigis per serĉado de ĉeĥaj »herezaj« libroj. — Red. rim.

amaso da homoj kaj da infanoj, kiuj ilin atendis. Kun niaj infanoj ili amikiĝis tre rapide kaj baldaŭ ili estis en vigla konversacio. Mi preteriris diversajn grupojn da infanoj aŭskultante ilian interparolon.

»Ĉu vi havas tie ĉi ankaŭ ĉeĥajn lernejojn?« — demandas unu Viena infano. La niaj ridas laŭte kaj respondas kelkaj samtempe: »Ni ja estas ĉeĥoj, ĉu ni povus viziti alian lernejon, krom la ĉeĥa?« — »Ĉu ni vidos ankaŭ la „paĉjon Masaryk“?« — demandas eble okjara knabino de malriĉa staturo. Surprizita per tiu ĉi demando, kiu montras amon al nia regnestro, mi alparolas la infanon: »Kiu rakontis al vi pri „paĉjo Masaryk“?« La knabino rigardas min trankvile per siaj bluaĵ okuloj kaj respondas: »Mia patro, kiu mortis antaŭ kvar semajnoj, parolis ofte pri li.« — En la apuda grupo demandas unu knabo sian ĉeĥan kolegon, ĉu li povas montri al li ĉeĥoslovakian kronon. La demandita knabo fiere elprenas el sia poŝo kelkajn monerojn kaj tri el ili donas al la Vienano, klarigante: »Jen estas la krono, ĝen estas kvindek-kaj tie ĉi dudek-helero. Mi donacas ilin al vi.« La juna Vienano prenas kaj zorge envolvas sian »riĉaĵon« en la poŝtukon. Sed jam alvenas la gvidistoj, dividas la infanojn kaj transdonas ilin al iliaj gastigontoj. La tuta ceremonio estas baldaŭ finita. La grupoj kaj grupetoj eliras el la stacidomo kaj malaperas en diversaj stratoj.

Mi staras antaŭ la stacidomo, kortuŝita pro la viditaj scenoj el la vivo de Vienaj infanoj kaj en mia penso aperas demando: »Ĉu ili trovos en nia urbo veran senzorgecon...?«

A. K.

ooo

Koniáš balancis la kapon, kvazaŭ li volonte estus tion aŭdanta, sed la morgaŭon tuj frumatene li eniris kune kun la pastro Firmus kaj la famuluso en la domon de Lemfeld. Longe li ne restis tie. Post duonhoron li revenis en dekanejon kaj ridetante li metis sur la tablon tri librojn kaj montris ilin al la rondkorpa, mireganta dekano:

»Jen vi lin havas, la pian, nefalsitan kristanon, Georgon Lemfeld!«

Nun kuŝis la tri libroj sur la tombejo inter la aliaj, nudigitaj, ĉirkaŭŝiritaj. La tombisto forŝiris de ili kiel de ĉiuj pli grandaj libroj la malnovan kartonkovraĵon. Tuta amaso da kovraĵoj kolektiĝis tie, lignaj kovraĵoj, ledotegitaj, simplaj eĉ kun metalgarnaĵo, latunangulaj, kunagrafoj eĉ sen ili aŭ kun ledaj bindiloj. La kovraĵon oni deŝiris por ke la enhavo povu pli facile ekbruli, pli rapide ekflami kaj forbruli. La libroj estis markitaj per folietoj kun la nomoj de la ĝisnunaj posedintoj, al kiuj ili estis forprenitaj. Sed la libroj de la personoj, kiuj memvole ilin fordonis en la dekanejo, estis sen folietoj.

La nomoj de la pentantaj posedintoj ne estis vokataj tie ĉi apud la ŝtiparo; de tiu malhonorigo ili estis senigitaj. Ĝi estis la rekompenco por la obeemo.

La prediko estis finita, post ĝi murmurado kaj bruo de popolamaso, paŝanta malantaŭ la jezuitoj el la urbplaco en la preĝejon al la lasta misia diservo. Antaŭ la pastroj aro da gelernatoj, kiujn gvidis kantoro Vondřeĉ kaj lia helpanto. Kantante Maria-kanton Vondřeĉ kaj lia helpanto. Kantante Maria-kanton la amaso ŝovis sin tra la strato preter la dekanejo en la tombejan pordegon, en la preĝejon, en kies duonluno trembriletis sur la altaro flamoj de kandeloj, trivice, kvazaŭ oraj steletoj.

Kiam la diservo estis finita, kiam la orgeno finludis, ĉio ruliĝis el la preĝejo eksteren al la preparita lignoŝtiparo. Gelernantoj kun la kantoroj antaŭ tri misiistoj en nigraj sutanoj kaj altaj kvadratĉapoj, antaŭ la rondkorpa dekano kaj lia kapelano en blankaj surplisoj. La tombejo ne sufiĉis, premado ĉie. Eĉ sur la barilo staris knaboj kaj neplenkreskaj junuloj. Ĉiuj estis avidaj je spektaklo, ĉiu volis vidi la strangan ekzekuton.

Krepuskiĝis, silento, eĉ ne ekblovo. Estis sufoka julia antaŭvespero. Eĉ folieto sur la florantaj tilioj apud la preĝejo ne moviĝis. Ĉie sur la tombejo eĉ plue ekster ĝi la peza iliaodoro. Subite en la kunpremita, grizluma, kvazaŭ kunfandita amaso trapenetris ruĝo. Flamoj ekkrakis en la ŝtiparon, trarampis ĝin, elŝovis sin el ĝi kaj flagris supren. La ruĝa brilo flugetis ĉefe sur tiujn, kiuj staris plej proksime: la pala Koniáš, sangoriĉa Mateřovský kaj pastro Firmus, kies larĝa mentomo komencis pro ĝoja impreso moviĝi, eĉ dekano kun kapelano kaj malantaŭ ili la »urba rajto«:

la urbestro, sindikuso, konsilantoj, — inter ili ankaŭ Mikuláš Doubrava.

Tiuj malantaŭe en la amaso puŝis sin, streĉis la kolojn, starigadis sur fingrojn, ĉefe kiam de la flamo aŭdiĝis la voĉo de la misiistoj; jen Koniáš havis mallongan prologon: pereu la libroj, fonto de malbono, diabla verko plena de herezaĵoj, kun ili forbrulu la peka amo al ili. Li mansignis kaj studentofamuluso donis al li la unuajn volumojn, vokante: »La libroj de Václav Machovec, arbaristo el Skalka!« La preĝeservisto prenis ilin kaj ĵetis en la flamojn unue malnovan biblion ĉirkaŭŝiritan, sen kovraĵo. Samtempe la kantoro Vondřeĉ eksvingis la manon super la kapo, piedfrapis kaj ekkantis:

»Ekbruligu la herezaĵojn —«

En lian voĉon enfalis tuj la blekanta timoro de la instruista helpanto, eĉ aro da freŝaj voĉoj knabaj kaj knabinaj:

»Mortigu la inferajn monstrojn, forbruligu la idolanan malkredon —«

Post la biblio enfalis en la flamojn unua, tria libro. La folioj de malnovaj libroj pro varmego rapide ruliĝis, ondigiĝis, nigriĝis kaj en randoj tuj ardiĝis, brulis. Kaj denove oni ilin frapis, kiam la preĝeservisto kaj famuluso enjetadis la aliajn: aroj da fajreroj elflugis kaj denove ekbrulis volumo post volumo kaj denove la studento-famuluso vokis la nomojn de la posedintoj, de Georgo Lemfeld, kiu pli forte movis la amason, la nomojn de kampistoj el Očellice.

Libro post libro tremblis super la soifantaj flamoj, falis en ilin. Brulis kaj pereigis tie la fiero de prapatroj, la konsolo de ne unu generacio en la momentoj de angoro kaj de malĝojo, pereigis la sola konsolo, apogo kaj rifuĝejo de la lastaj fideluloj de la patra kredo. En cindron disfaliĝis la sankta biblio eĉ la »Profundo de sendanĝero«, preskaŭ nova »Krono de pieco« de Kleych kaj aliaj kaj aliaj. Molaj nubetoj de malhela fumo flugis rekte al malheliganta ĉielo kaj kune kun ili la sonado de la lernejoj kantistoj loĝitaj de la neordinara spektaklo, kantantaj kuraĝe, plenvoĉe la teruram mallbenon, kiun ili ne komprenis, kiu same kiel la tuta »aŭto da fé« firmiĝis kaj fortiĝis la al ili inokulitan abomenon kaj malamon al la glora pasinteco kaj al ĝiaj grandaj spiritoj. Plenvoĉe ili kantis kaj glorigis tion, pri kio oni predikis al ili, ke ĝi estas por la savo de ĉiuj.

Brulu, brulu, Hus Johano,
por ke ne brulu nia animo —

Sur la vizaĝoj de la misiistoj kontentigo: »la urba rajto« post ili kvazaŭ estus alrigardanta religian funkcion. Nur la konsilanto Doubrava pli mallevadis la okulojn ol li rigardis en la flamojn, aŭ li oblikve rigardis la terurajn misiistojn kaj pensis pri la maljuna Lem-

feld kaj la arbaristo Machovec, ke tiu ĉi heroe decidiĝis, dume li, Doubrava, ĉiam estas ambaŭpartia, alian kredon en la koro, alian en la buŝo. Kaj li pensis pri siaj deksep nekatoĵikaj libroj kaj ektimadis kiel longe estos ankoraŭ eble kaŝi ilin, kiel longe li povos ankoraŭ sin mem kaŝi.

La flamoj flagris alten, krakis, la nuboj da fumo pli dense ruliĝis kaj pli kaj pli sone sin portis en la sufoka ĵulta vespero la kanto de infanoj super la tombojn, post la barilon kaj pli malproksimen inter la malheligantajn ĉar-pentikabanojn.

La maljuna Lemfeld sidis hejme en la angulo apud la pordo afliktita, la kunfingritajn manojn sur la genuoj, la kapon mallevitan, sola kaj sola. Li havis nenium kaj la homoj el la domo estis forkurintaj sur la tombejon. Nenium li havis kaj kio restis al li post la prapatroj kara, la malnovaj libroj, lia trezoro, tio estis en la nuna momento forbrulata. Kaj oni kantis al tio. Infanoj, la fremdigitaj infanoj kantas, kiel oni ilin instruis en la lernejo! La mallklara resono de ilia tonsonado penetris ĝis en ĉi tiun grizluman ĉambiron, en ĝian malgajan silenton.

En malhela angulo apud la pordo leviĝis la blanka kapo de maljunulo. Momente ĝi aŭskultis, sed subite ĝi skuiĝis de doloriga ploro. —

— ? —

Kvin abonantoj de nia gazeto, kiuj nomos al nia redakcio la aŭtoron de la sekvanta fragmento kaj divenos de kiu artikolo aŭ parolado ĝi estas prenita, ricevos de la redakcio po unu bela fotografajo (ĝi estas pligrandigo de originala fotografajo!) de dro L. L. Zamenhof. La bildo, kiu estas en moderna kadro, estos bela ornamo de la loĝejo. Ni sendos ĝin aŭfrankite.

Tempolimo: 30. septembro t. j.

La lotumo de la gajnintoj okazos la 30. sept. vespere dum la membra kunveno de Esperantista klubo en Plzeň. Interesuloj povas ĉeesti.

»De la tempo, kiam la Esperantistoj ĉesis paroli pri reformoj, komenciĝis por Esperanto periodo ĉiam pli kaj pli brilanta. En la komenco, sub la premo de tre grandaj malhelaj eksteraj, ni progresadis tre mall rapide kaj malfacile. Sed sub la influo de nia plena interna harmonio kaj nia nedekliniĝa irado rekte antaŭen, niaj fortoj ĉiam pli kaj pli kreskis. Nun ni atingis tian potencon, pri kiu multaj el ni antaŭ dek jaroj ne kuraĝis eĉ revii, kaj se ni marŝos en tia sama harmonio kiel ĝis nun, neniam forto en la mondo povos haltigi nian iradon, kaj ni plene atingos nian celon. Ĉiuhore kreskas la nombro de niaj partianoj, ĉiutage pligrandiĝas la nombro de niaj grupoj. Nia literaturo kreskas tiel senhalte kaj rapide, ke multaj malgrandaj nacioj jam nun povas nin envii. La praktika uzado de nia lingvo

fariĝas ĉiam pli kaj pli granda. Dum ankoraŭ antaŭ ne longe oni tute silentis pri ni kaj poste oni nin mokis, nun oni jam ĉie nin respektas, kiel grandan potencon. Eĉ tiuj niaj principaj kontraŭuloj, kiuj antaŭ ne longe mallate rigardis nin de alte, nun jam krias alarmon. Nia lingvo mem konstante pli riĉiĝas kaj elastiĝas.«

POR KURSANOJ.

Bonege.

Kiam la komitato de la Franca Akademio okupis sin per kunmetado de la fama Akademia Leksikono, venis en la salonon, kie la kunveno estis okazanta, s-o Cuvier, la eminenta natursciencisto. »Ni ĝojas, ke vi alvenis« — diris unu el la kvardek sinjoroj*) — »ni ĵus decidis unu difinon, kiu al ni ŝajnas esti kontentiga, sed tamen ni volas aŭdi ankaŭ vian opinion. Ni difinis la vorton »kankro« per tiu ĉi klarigo: kankro, malgranda ruĝa fiŝo, kiu sin movas en direkto mallantaŭa.« »Perfekte, sinjoroj,« — diris Cuvier — »sed permesu al mi fari tute negravan rimarkon: La kankro ne estas fiŝo, ĝi ne estas ruĝa kaj ĝi sin ne movas en direkto malantaŭa. Alie via klarigo estas tute perfekta.«

La okulvitroj.

Unu vilaĝano vidis, ke maljuna homoj ofte uzas por legado okulvitrojn. Li iris al optikisto kaj volis ilin aĉeti. La optikisto juĝis, ke la vilaĝano ne volos pagi multe kaj tial li alportis okulvitrojn tute mallakrajn. La vilaĝano metis ilin sur la nazon kaj por momento rigardis en la libron, kiu ĉi elprenis el sia poŝo. Post nelonge li demetis ilin dirante: »Mi ne povas legi per ili, donu al mi pli bonajn.« Nun la optikisto alportis kelkajn parojn de tre bona kvalito kaj diris al la vilaĝano, ke li elektu paron, kiu konvenos al li. La vilaĝano provis ĉiujn, sed ĉiam li ripetis: »Mi ne povas legi.« Fine la optikisto en embaraso demandis: »Kaj ĉu vi scias legi?« »Se mi scius legi, mi ne bezonus viajn okulvitrojn!« — estis la respondo.

La lasta leciono.

Rakonto de juna Alzasano.

Tiun matenon mi iris mallfrue en la lernejon kaj mi timis esti riproĉata, tiom pli, ke s-o Hamel diris al mi, ke li demandos nin pri participoj kaj mi scius eĉ ne unu vorton. Unu momenton venis al mi la ideo ne ĉeesti la lecionon kaj fari promenon tra la kamparo. La vetero estis tiel varma, tiel klara! Sed tamen mi rezistis kaj kuris rapide en lernejon.

Kiam mi preterpasis la domon de vilaĝestro, mi vidis, ke tie amasiĝis homoj antaŭ la kesteto por afiŝoj. De du jaroj venadis de tie malbonaj novaĵoj: la perditaj bataloj, rekvizicioj, ordonoj de komandego, kaj tial mi pensis, ne haltante tie: »Kio estas ankoraŭ tie?«

Ordinare antaŭ la komenco de la leciono estis en la klaso granda bruo, aŭdebla ĝis en la straton. Sed ĵus ĉi tiun tagon ĉio estis trankvila kvazaŭ

*) La Franca Akademio laŭregule estis kvardekmembra.

en dumanĉa mateno. Tra la malfermita fenestro mi vidis miajn kamaradojn okupi siajn lokojn kaj sinjoron Hamel paŝi kun sia terura linilo sub la brako. Mi devis malfermi pordon kaj eniri en tiun silenton. Sinjoro Hamel rigardis min sen kolero kaj diris al mi dolĉe: »Iru rapide al via loko, mia malgranda Frantz, ni jam komencis sen vi.«

Mi saltis en la benkon kaj tuj sidigis. Nur nun mi rimarkis, ke nia instruisto havas sian belan verdan redingoton, la brustumon bele gladitan kaj la broditan ĉapon el nigra silkko, kiujn li surprizis nur en tagoj de inspekto aŭ disdono de premioj. Cetere la tuta klaso enhavis ion neordinaran, ion solenan. Sed kio plej multe min surprizis, estis la homoj el nia vilaĝo, sidantaj malantaŭe en la benkoj, kiuj ordinare restis liberaj. Jen estis la maljuna Hauser kun sia trikorna ĉapelo, la malnova vilaĝestro, la malnova leterportisto kaj ankoraŭ pli da aliaj personoj. Ili ĉiuj ŝajnis esti malgajaj. Hauser alportis sian malnovan alfabetlibron kun disŝiritaj randoj kaj havis ĝin malfermitan sur siaj genuoj. Liaj grandaj okulvitroj kuŝis sur ambaŭ paĝoj.

Dum mi kun surprizo observis ĉion, s-o Hamel starigis al sia seĝo kaj per same dolĉa voĉo, per kiu li estis min akceptanta, li diris al ni: »Karaĵ infanoj, la lastan fojon mi vin instruas. Ordono venis el Berlino, ke en la lernejoj de Alzaso kaj Lotringo oni ne plu permesas instrui alie, ol en la lingvo germana... La nova instruisto alvenos morgaŭ. Hodiaŭ estas via lasta leciono en la lingvo franca. Mi petas, ke vi atentu.«

Tiuj vortoj min emociis. Ho, mizeruloj, jen kio estis elmetita sur la domo de la vilaĝestro!

Mia lasta leciono en la lingvo franca!... Mi pensis pri diversaj aferoj, kiam mi ekakutis voki mian nomon. Estis mia vico reciti. Kion mi estus doninta por la povo diri ĉiujn regulojn de la participoj laŭte, klare, senerare! Sed jam post la unuaj vortoj mi eraris kaj mi restis stari, balancigante, en mia benko kun premita koro, ne kuraĝante levi la kapon. Mi aŭdis s-on Hamel, kiu parolis al mi: »Mi ne riproĉas vin, mia kara Frantz, vi estas sufiĉe punita... vidu kio estas... Ĉiujn tagojn oni diradis: Ah, mi havas sufiĉe da tempo, mi lernos morgaŭ, kaj nun vi vidas kio alvenis... Ho, tio estis la plej granda malfeliĉo de niaj Alzasanoj, ĉiam demeti siajn devojn al morgaŭo. Nun la homoj rajtas diri al ni: Kiel? Vi pretendas esti Francoj kaj vi scias nek paroli, nek skribi vian lingvon!? En tio ĉi, mia kompatinda Frantz, vi ne estas plej kulpa. Ni ĉiuj havas kaŭzon fari al ni riproĉojn.

Nun s-o Hamel komencis paroli pri la lingvo franca. Li diris, ke ĝi estas la plej bela lingvo de la mondo, la plej klara, la plej detala. Ĝi meritas, ke ni ĝin gardu kaj forgesu neniam, ĉar se ĝi popolo estas falinta en sklavecon kaj ĝi bone konservas sian lingvon, ĝi estas, kvazaŭ ĝi tenus la ŝlosillon de sia malliberejo...

Poste li prenis gramatikon kaj legis nian lecionon. Mi miris, kiel bone mi ĉion komprenis. Ĉio, kion li diris, ŝajnis al mi facila, tre facila. Mi kredas ankaŭ, ke neniam mi tiel bone aŭskultis kaj ke li neniam enmetis tiom da pacienco en siajn klarigojn. Oni povis diri, ke tiu bedaŭrinda homo volis doni al ni sian tutan scion, lasi ĝin eniri en nian kapon en unusola guto.

La leciono estis finita kaj ni transiris al la skribado. Por tiu ĉi tago s-o Hamel preparis tute novajn modelojn, sur kiuj estis skribite bele

ronde: Francujo, Alzaso, Francujo, Alzaso. Oni povis vidi, kiel ĉiu atentis. Kaj kia silento! Oni aŭdis nenion krom la grincado de la plumoj sur papero.

De tempo al tempo, kiam mi levis la okulojn de mia papero, mi vidis s-on Hamel senmova sidi sur sia seĝo kaj fikse rigardi la objektojn ĉirkaŭ si, kvazaŭ li volus enporti en sian memoron la tutan lernejan dometon... Konsideru! De kvardek jaroj li estis sur tiu ĉi loko! Kia malĝojo devis esti por tiu ĉi bedaŭrinda homo forlasi tie ĉi ĉion kaj foriri kun sia fratino, kiu supre en la ĉambro preparis la valizojn, ĉar morgaŭ ili devas foriri — por ĉiam.

Post la skribado ni havis lecionon de historio. Poste la malgrandaj lernantoj kantis komune »ba, be, bi, bo, bu«. Tie malantaŭe, en dorso de la klaso, la maljuna Hauser surmetis la okulvitrojn kaj tenante sian alfabetlibron per ambaŭ manoj li silabumis la literojn kun ili. Lia voĉo tremis pro emocio kaj estis interese vidi, ke ni ĉiuj estis proksimaj de rido kaj de esploro. Ah, mi neniam forgesos ĉi tiun lastan lecionon...

Subite la preĝeja horloĝo komencis sonori la tagmezon kaj poste anĝeluse... En la sama momento eksonis sub niaj fenestroj la trumpeto de Pruso, kiuj estis revenantaj de sia ekzerco.

S-o Hamel sin levis, tute palla, de sia seĝo. Neniam li ŝajnis al mi tiel granda. »Miaj amikoj! — li diris — »miaj amikoj, mi... mi...« Sed io sufokis lin. Li ne povis fini la frazon. Tial li turnis sin al la tabulo, prenis pecon da kreto kaj kolektinte ĉiujn fortojn li skribis per grandaj literoj:

»Vivu Francujo!«

Poste apoginte la kapon je la muro, senparole li faris signon per sia mano:

»Estas finite... iru.«

(Laŭ la franca originalo de Alf. Daudet.)

KULTURO

Memorindaj datoj en julio: La 1. j. 1646 nask. G. W. Leibnitz en Leipzig, germ. filozofo kaj matematikisto. — La 2. j. 1778 mort. en Ermenonville franca fil. pedag. kaj verkisto J. J. Rousseau. — La 4. j. 1776 estis deklarita sendependeco de Usono. — La 6. j. 1415 estis en Konstanz bruligita Majstro Jan Hus, la ĉeĥa eklezia reformisto. — La 7. j. 1893 mortis Guy de Maupassant, franca verkisto. — La 9. j. 1357 estis metita fundamentŝtono de la fama ponto de Karolo IV. en Praha. — La 11. j. 1905 estis en Francujo proklamita disigo inter la eklezio kaj ŝtato. — La 14. j. 1789 estis en Parizo venkoakirita la kastelo kaj la fama malliberejo Bastille. La nacia festo en Francujo. — La 15. j. 1606 nask. Rembrandt, holanda pentristo. — La 18. j. 1870 estis voĉdonita la dogmo pri la papa neerareblo. — La 19. j. 1870 komencis la pruso-franca milito. — La 21. j. 1848 nask. V. Mysbek, la emin. ĉeĥa skulptisto. — La 24. j. 1802 nask. en Villers-Cotterets franca verkisto Alex. Dumas, la patro. — La 25. j. 1467 estis deklarita papa anatemo pri la bohema ĥusana reĝo Jiří z Poděbrad (Georgo el Poděbrady). — La 27. j. 1841 estis en duelo mortigita rusa poeto M. I. Lermontov. — La 28. j. 1914 komenciĝis la mondmilito. — La 31. j. 1627 per la dekreto de Ferdinando II,

Habsburga, estis el la bohemiaj landoj ekzilitaj ĉiuj protestantoj. (36.000 familioj devis tiam elmigri.)

Pri la ĉeĥa lingvo.

Unu el niaj eksterlandaj amikoj esprimis la deziron, ke ni klarigu la elparoladon de diversaj literoj uzataj en la ĉeĥa lingvo. Ĉar tiu ĉi afero interesas ankaŭ aliajn ne ĉeĥajn amikojn de nia gazeto, ni volonte plenumas la deziron:

La ĉeĥlingva alfabeto estas jena: a, á, b, c, ĉ, d, ě, e, é, ě, í, g, h, ch, i, ĵ, j, k, l, m, n, ň, o, ó, p, r, ř, s, š, t, ť, u, ú, ů, v, y, ý, z, ž.

La elparolado. La ĉeĥa lingvo estas fonetika: oni legas ĉiun literon kaj ĉiun vorton kiel ĝi estas skribita — same, kiel en Esperanto. La vokaloj supersignitaj per streketo: á, é, í, ó, ú, ý (kaj ankaŭ la silaboj enhavantaj tiujn literojn) estas elparolataj longe. Vokaloj sen streketoj estas mallongaj. Ankaŭ »ŭ« estas elparolata longe. Se longa »u« estas la unua litero en la vorto, oni markas ĝin per streketo (ú): úkol (tasko), úcta (estimo). Alie longa »u« estas markata per rondeto (ũ): důvod (kaŭzo), dolů (malsupren). La literon »ě« oni legu »je«.

»Č« egalas esp. »ĉ«, »ch« egalas »ĥ«, »š« egalas »ŝ« kaj »ž« estas esp. »ĵ«.

La litero »ň« estas elparolata same kiel »gn« en la franca vorto »Boulogne« (tiu ĉi vorto skribita ĉeĥe estus: »Buloň«) aŭ »n« en la angla vorto »new« (»New York« skribita per ĉeĥa skribmaniero estus: »Nŭ Jork«). Atentu, kiamaniere estas la »ň« elparolata: la mezon de la lango oni metas al la palato, la pinto de la lango tuŝas la malsuprajn dentojn kaj tra la nazo estas elspirata sono »n«, kiu tiamaniere sin ŝanĝas en »ň«. Tiel same metu la langon, volante elparoli la ĉeĥajn sonojn »ď« kaj »ť«: la mezon de la lango al la palato, la pinto de la lango tuŝu la malsuprajn dentojn. Nun elspiru (tra la buŝo, ne tra la nazo) la sonon »d«, kiu sin ŝanĝos en »ď«. Metu la langon sammaniere kaj elspiru la sonon »t«. Ĝi estos »ť«.

Di, ti, ni, oni legu di, ti, ŝi! Dě, tě, ně, oni legu de, te, ŝe! Alie »i« kaj »y« estas legataj kiel esp. »i«.

La akcento estas sur la unua silabo.

Ekzercoj. Legu: Bože můj! (Dio mia!) Nějaký zálek (tu lernanto), děkuji Vám (mi dankas al Vi), po těchto slovech (post tiuj vortoj), srdečný dík! (koran dankon!) přijďte zítra ke mně (venu morgaŭ al mi). Pan Staněk je československý ministr (sinjoro Staněk estas ĉeĥoslovaka ministro). Plzeň leží v západní části Čech (Plzeň kuŝas en la okcidenta parto de Bohemujo). Praha je největší město československé (Praha estas la plej granda urbo ĉeĥoslovaka).

La litero »ř«. Ĉi tiun sonon oni ricevas jene: metu la langon kvazaŭ vi volus elparoli la esperantan »r«, sed elspiru la sonon »ž«. Vi aŭdos sonon, kiu estas nek »r«, nek »ž«. Ĝi estas la ĉeĥa sono »ř«.

Ekzerco. Legu: Říjen (oktobro), Řecko (Grekujo), řeka (rivero), Bedřich (Frederiko), Paříž (Parizo).

La familiaj nomoj de virinoj estas en la ĉeĥa lingvo formataj tiamaniere, ke al la nomoj viraj oni aldonas —ová. Ekzemple: Pan Masaryk (s-o Masaryk), paní Masaryková (s-ino Masaryková), slečna Masaryková (f-ino Masaryková). Pan Beneš, paní Benešová. Se la vira nomo finas per —ý, tiam tiu ĉi litero ĉe la virina nomo

estas ŝanĝata en —á; pan Moudrý, paní Moudrá, pan Vrbenský, paní Vrbenská.

(Nia redakcio estas volonte preta sendi ĉiujn deziratajn informojn pri la ĉeĥa lingvo al niaj fremdlandaj abonantoj.)

Kelkaj rimarkoj pri bruligado de l' kadavroj.

La enterigado de l' kadavroj estas kutimo, kiun povas nemiu homo aprobi. Kaj precipe la medicinistoj longe batalas kontraŭ ĝi, sciante bone, ke tiu ĉi maniero estas tute malbona, ĉar ĝi en multaj okazoj estas kaŭzo de danĝeraj epidemioj. Ĉiu pli granda pluvo, forŝovo de l' tero, nome printempe, akvo k. t. p. povas disporti la mikrobojn en ĉirkaŭaĵon, kaj tiu ĉi danĝero en grandaj urboj jam multfoje postulis homajn vivojn. Multaj bakterioj en la tero ne putras, sed longe vivas kaj la tombetoj ne donas al ni sekuran garantion. Ju pli rapide mortos bakterioj, des pli sekura estas ĉirkaŭaĵo. Kaj tio farigaĵo per bruligado de l' kadavroj. Tombejoj bezonas grandajn lokojn, kiujn ni povus pli bone uzi kaj el estetika vidpunkto, ĉu estas agrabla la rememoro pri tiuj, kiuj putras longe, malrapide en malluma tombo? Vere ne! Ni ne povas tion aprobi el vidpunkto estetika kaj precipe ne el vidpunkto higiena. Kiom kostas funebraj ceremonioj! Kaj trankvilo en la tombo ne estas eterna. Kium ironion diras al Vi la surskriboj: Ripozu en paco eterna ktp. Post kelkaj jaroj, se vi ne povas pagi, oni entombigos sur la saman lokon alian homon. Ni lernu esti respektaj al tiuj, kiuj mortis. Sed en kolumbarioj estas vere paco eterna, tie ripozas ĉiuj, riĉulo flanke de malriĉulo, tute laŭ leĝoj de l' demokratio. Samideanoj, subtenu nin, kiuj batalas kontraŭ barbara kutimo de enterigo, pripensu iom tutan aferon kaj vi vidos, ke ni celas aferon bonan el ĉiuj vidpunktoj. Kaj tiu, kiu konsentas, ne forgesu aliĝi al societo »Krematorium«, Praha, Spálená. Ĉiuj Viaj demandoj estos precize kaj baldaŭ plenumitaj. Ni volas helpi al pliboniĝo de popola sano. — M. U. C. Riedl

ooo

ĈEĤOSLOVAKIO.

Vere interesa statistiko eliris el la ĉs. parlamento, kie la germanaj deputitoj prezentis interpelacion pri la subpremado de germanlingvaj lernejoj. La ministro Srobár respondis la interpelacion jene: »La leĝo el la 3. apr. 1919 permesas nuligi la lernejojn, kiuj havas malpli ol 40 infanojn, sed en praktiko oni ankoraŭ neniam nuligis al lernejon kun pli ol 20 infanoj. La nombro da germ. lernejoj havantaj nur 20—30 lernantojn estas granda. Oni nuligas ne nur germ., sed ankaŭ ĉeĥajn lernejojn. La landa lerneja konsilantaro proponas en la nuna jaro nuligi ankaŭ 56 ĉeĥajn lernejojn, en kiuj la nombro da infanoj estas malpli alta ol 40. Kontraŭe ne estos nuligitaj multaj lernejoj germ. kun malpli ol 20 infanoj, pro granda malproksimo de najbara lernejo. El la elspezo 597,620,954 Kč por la naciaj lernejoj en Bohemujo, ricevas germanoj 35.87 procentojn, sed ĉeĥoj nur 64.13 proc., kvankam tie vivas 66.6 proc. da ĉeĥoj kaj 33.03 da germanoj.« Pri la mezaj lernejoj diris la ministro: »En Bohemujo apartenas unu ĉeĥa meza lernejo al 34.300 ĉeĥoslovakoj sed unu germ. meza lernejo jam al 26.900 germanoj. La stato de germ. mezaj lernejoj estas entute jena: En Bohemujo estas 35.5 proc. da germ. mezaj lernejoj. En Moravio,

kie vivas 19.6 proc. da germanoj, ili havas 34.4 proc. da mezaj lernejoj. En Silezio vivas 34.1 proc. da germ. kaj da mezaj lernejoj ili havas 54.5 proc. En Slovakujo estas 4.7 proc. da germ., kiuj havas 7 proc. da mezaj lernejoj. En la tuta respubliko vivas 25.3 proc. da germanoj, sed ili havas 31.1 proc. da mezaj lernejoj.

Ĉs. socialdemokrata partio enhavas 2679 da diverslokaĵaj organizaĵoj kun 191.184 membroj. La laborista gimnastikista asocio enhavas 830 unuigojn kun 100.000 membroj. La partio eldonas 39 polit. gazetojn.

Pri Majstro Johano Hus parolis la ĉefa verkistino A. Kožminová dum la festvespero de Esp. klubo en Plzeň. Ŝi diris tie kelkajn faktojn ĝis nun ne multe konatajn: Ŝia patro, prof. Zimmerhanzl, kun kelkaj aliaj studentoj en la jaro 1873 penis revivigi le memoron pri Hus, kiu ĝis tiu tempo estis en la tuta nacio forgesita. Post multaj klopodoj ili sukcesis kolekti iom da mono, por kiu ili havis la ĉambreton en Husinec, kie Hus naskiĝis. (Antaŭe oni uzis tiun ĉambreton kiel kameron por diversa ilaro.) La ĉambreton ili ordigis kaj elmetis tie memorlibron. Baldaŭ poste ili tie aranĝis popolkunvenon; kiu partoprenis pli ol 20.000 homoj. La sekvintan vesperon iris prof. Zimmerhanzl hejmen el unu vilaĝo. En la kamparo elliris kontraŭ li unu konata katolika pastro, kiu levante la krucifikson postulis, ke li ĉesu revivigi la bruligitan herezulon. Kiam prof. Z. respondis, ke la roma eklezio faris krimon kontraŭ Hus, la pastro malbenis lin kaj liajn posteulojn. La domon, en kiu Hus naskiĝis, aĉetis poste la gimn. unuigo »Sokol« en Praha, kies posedaĵo ĝi estas ĝis nun.

DIVERSAĴOJ

La venonta numero de »La Progreso« aperos la 15. de oktobro! Tial ne sendu reklamajojn! Al niaj legantoj ni deziras agrablan uzon de la libertempo. — La redakcio.

Atentigo! El la rondo de niaj legantoj ni estis atentigitaj, ke en nia gazeto aperas vortoj, kiuj ne estas troveblaj en simplaj esp.-ĉefaj vortaroj. Tial ni petas la legantojn atentigi nin pri tiuj vortoj kiujn ni volonte klarigos en la sekvontaj numeroj.

En la redaktado de nia gazeto de nun kunlaboros verkistino s-ino A. Kožminová.

El la familio de Progresanoj. S-o A. Pitlik, ĉefkomisario en la ministerio de komerco en Praha kaj f-ino M. Zahradníková, profesoro de realgimnazio festis la 1. jul. sian geedziĝon. Ni sincere gratulas al ili! La redakcio. — Al s-o J. Pech, prezid. de Lab. Ligo Esp. en Plzeň, mortis la patro. Ni esprimas al li sincerajn kondolencojn. La Pr.

La I. kongreso de ĉs. esperantistoj sukcesis tre bone. Ĝin partoprenis preskaŭ 300 personoj el ĉiuj partoj de la respubliko. La festa kunsido okazis sub prezido de prof. Kamarýt en la landa parlamento en ĉeesto de la landa prefekto dro. Pluhař, kiu en sia alparolo akcentigis la gravecon de Esp. Poste salutis la kongresanojn dr. Simonek el Chicago, franca esp. Engelman, la rusa Leonid Popov, polo Schiffer, germano dr. Simon, por virinoj s-ino Vaščeková kaj por blinduloj s-o Krehňák. Laŭ propono de la prezid. oni sendis salut-telegramojn al prezid. Masaryk kaj al ĉefmin. Beneš. Raportojn prezentis: prof. Fridrich; pri la

konferenco en Genevo, S-o Rendl el Plzeň; pri organigo de esp. laboristoj, S-o Sklenčka; pri regionaj organizaĵoj esp. Prof. Kamarýt; pri instrado de esp. en Ĉeĥoslovakio, S-o Ginz; pri agado de la propaganda sekcio de ĈAE. kaj pri la helpo al malsatantaj esp. en Rusujo. La akceptitajn rezoluciojn oni transdonis al komisionoj. Kiel lokoj de venonta kongreso estis proponitaj Plzeň aŭ Reichenberg (Liberec). Al la samideanoj en Brno apartenas la dankemo de ĉs. esp. pro bonega aranĝo de la kongreso.

Ekzamena komisiono de ĈAE. donis laŭ rezulto de ekzamenoj la 10. VI. 1922 en Brno ateston pri kapableco instrui Esp. en lernejoj kaj en kursoj al s-o J. Dubný, mineja oficisto en Orlová kaj ateston pri scio de Esp. al s-o J. Neděla, mineja oficisto en Lazy.

Rusaj esperantistoj malsatas, malsanas kaj mortas! Helpu rapide, kolektu monon kaj aĉetu la plej nutrajn produktojn kaj sendu ilin pere de la Ruĝa kruco al la jena adreso: Helpejo de malsatantaj esperantistoj de Kaŭkazo, Sennaja, N. 56, Pystigorsk.

La Internacia Ligo por Defendi Rajton de Malgrandaj Nacioj (sidejo en Genevo) laŭ sia aprobita statuto havas du oficialajn lingvojn: la francan kaj Esperanton.

Jurnalo, tagjurnalo kaj gazeto. Multaj el niaj gazetoj, precipe germanaj, ĉeĥoslovakaj kaj hungaraj skribas erare »tagjurnalo« anstataŭ »jurnalo«. Bedaŭrinde la gramatikoj ne donas bonajn klarigojn, kaj la ne latinidaj samideanoj kredas ke gazeto estas sinonimo de jurnalo. Gazeto oni diras por ĉiuj periodaĵoj, tio estas la ĝenerala vorto; estas la »Zeitung« de la germanoj. La latinidaj lingvoj, krom la vorto gazeto (I. gazetta, F. gazette), posedas alian substantivon por gazetoj, kiuj aperas ĉiutage (F. jour = tago »journal«, I. giorno = tago »giornale«, H. dia = tago »diario«). Mi komprenas, ke la germanoj aŭ aliaj samideanoj, kiuj konas nur la germanan lingvon kiel »fremda lingvo«, tradukas »Zeitung« per »jurnalo« kaj »Tageszeitung« per »tagjurnalo«, anstataŭ »Zeitung« = gazeto, kaj »Tageszeitung« = »jurnalo«. Eble ne ĉiuj gazetistoj (jurnalistoj) legis la belan artikolon de nia L. K. S-ro Stojan kaj ankoraŭ pli bonan klarigon de la redakcio de la organo de U. E. A. »Esperanto« No 249 majo 1921 paĝ. 81. — F. G. I.

Antverpeno (Belglando). - Internacia ekspozicio de fotograf-arto. Dum la monato aŭgusto 1923a la Reĝa Societo de Fotografaj kaj Sciencaj Studoj de Antverpeno organizos tiun internacian ekspozicion, en kiu ĝi invitas partopreni precipe neprofesiajn fotograf-amantojn de la tuta mondo. Oni petu la regularon en Esperanto ĉe la citita societo, adreso: Poŝta Kesto 763, Antverpeno. La Esperantistaj delegitoj kaj grupoj estas petataj konigi tiun informon per la lokaj fakaj gazetoj kaj asocioj. (La Esp. gazetoj bonvolu represi.)

Kroniko. Esp. Klubo de Plzeň montras tre viglan vivon: La 1. de junio ĝi aranĝis publikan paroladon de F. J. Havelka el Praha »Pri aŭstriaĵaj internigejoj kaj krimulejoj«, kiun partoprenis preskaŭ 600 personoj. La 6. jul. la klubanoj partoprenis kun sia flago manifestacian procesion tra la urbo, aranĝatan de la loka sekcio de la lerneja societo Ustř. Matice Školní, por honorigi la memoron de Majstro Johano Hus. La 8. jul. la klubo aranĝis festvesperon de Hus, kiun partoprenis la ĉefa

verkistino A. Kožmínová, kiu paroladis pri nov-epoka kulto de Hus kaj s-o Arthur Whitham el Burnley en Anglujo, kiu parolis pri utileco de Esp. dum la vojaĝo kaj pri rilatoj anglo-ĉeĥaj. Post lia parolo la kapelo ludis la anglan, francan kaj ĉs. himnojn. — La esp. rondeto en **Staňkovy** aranĝas ĉiumerkrede konversaciajn kunvenojn je la 8. vesp., kiujn gvidas s-o Fr. Ernst. — **En Plzeň** estis fondita nova societo: Esp. Asocio en Plzeň V. Ĝia kunveno estas en la rest. »U tři sokolí« sur placo de Masaryk. Kunvenoj marde kaj vendrede post la 7. horo vespere. — **En Frýdek** ap. Místek gvidas s-o V. Jaroš kurson por skoltaj. — **En Liberec** (Reichenberg) la Ĉeĥa esp. societo »Estonteco« vigle laboras. En la nuna jaro okazis jenaj kursoj de Esp.: publika, kiun gvidis s-o instruisto Knáček, por fervojistoj, kiun gvidis s-o prezid. Haase, kurso de »Osvětový odbor« ĉe artil. regimento no. 253 kaj kurso ĉe la infant. regim. no. 44. La societo partoprenis aranĝojn de la loka germana esp. societo kaj de la esp. grupoj en ĉirkaŭaĵo. La vizitantoj de la »Foiro« vizitu la societon en la »stacidoma restoracio« (merkrede post la 20. horo.)

○○○○

LABORISTA LIGO ESPERANTISTA.

(La raportojn por tiu ĉi rubriko oni sendu plej malfrue ĝis la 10. de ĉiu monato al k-do J. Pech, Plzeň, Houškova ul. 4.)

Gekamaradoj kunhelpu!

Kiel jam estas konate laŭ lasta raporto en »La Progreso«, jam L. L. E. ekfunkciis, sed ni permesas atentigi niajn gek-dojn, ke nun ni ne povas trankvile ripozati. La sukcesoj ne dependas de la fondita ligo, sed ni bezonas vian kunhelpon. Ni volas progresi kaj la sukcesojn ni povas atingi nur per reciproka komuna laboro. Ĝis nun ni ne kontentigis kaj verŝajne ankaŭ vi ne estas kontentaj per nia laboro dum la pasintaj monatoj, kvankam ni multe propagandis. Atendas nin nova laboro, ni devos denove senlace klopodi kaj kolekti niajn fortojn laŭ nia povo. Se ĉiu nia membro tiel laboros fidele kaj senlace, ni en la sekvontaj monatoj atingos tion, kion ni ĝis nun vane deziris.

Gekamaradoj! Ni vin ĉiujn urĝe kaj persiste petas: ne ŝovu viajn manojn en poŝojn, pripensu, ke nur per komunaj fortoj kaj per reciproka kunhelpado ni firmigos nian movadon. Ni ĉiuj firme staru sur nia ŝipeto kaj senlace, persiste ni ĝin veturdirektu al la sin jam montranta celo. Ĉiu estu kaj restu ĝis la lasta momento sur la ferdeko, nur tiam povas nia sankta ideo efektiviĝi.

La Ligo esperas, ke la helpvoko ĝia ne estos vane kriata en la ĝisnunan dezerton de la laboristaro, ke vi post iometa ripozo per nova kurraĝo kaj entuziasmo komencos vekti la dormantojn, por ke nia familio laborista disvastiĝu en ĉiuj anguloj de la mondo. »Ju pli frue ni semas, des pli frue ni rikoltos«. Ni ja ne volas monon, ĉar ĝi estas nur senutila rimedo en niaj manoj; sed aliĝu! Aliĝu ĉiuj Ĉeĥoslovakioj! Farigu anoj de la internacia proletaria familio!

Veku, ho veku, veku konstante,
Ne timu ridon, insulton.

Voku, ho voku, ripetadante,
Ĝis vi atingos aŭskulton!

Adresu ĉion al »Laborista ligo esp., Plzeň-Peklo, Ĉeĥoslovakio«, aŭ al k-do Josef Pech, Houškova ul. 4, Plzeň.

II. Laborista tutmonda kongreso en Frankfurt a. Main (Germanio) la 12—16 aŭgusto 1922. Lab. Ligo Esp. en Ĉeĥoslovakio elektis du delegitojn al la lla kongreso: K-do J. Pešek kiel raportisto kaj k-do R. Burda kiel parolanto. Krom tio partoprenos neoficiale elektita delegito V. Pedál por sekcio Újezd apud Plzeň. Aliĝis pli ol 40 anoj, kiuj partoprenos la kongreson. En informa kunveno oni decidis la forveturon jene: Sabate matene la 1. h. forveturo el ĉefstacidomo Plzeň per rapidvagonaro al limurbo Cheb (germ. Eger). Ĉi tie estos mallonga paŭzo kaj la liberan tempon oni eluzos por konatiĝi kun aliaj fremdlandaj kongresanoj, kiuj de tie kune forveturos. Pri detalaj informoj turnu vin al R. Burda, Letná 152 apud Plzeň, aŭ al la kongresa komitato en Frankfurt.

Esp. laboristoj en la Liberurbo Danzig invitas al la Antaŭkongreso okazonta en Danzig la 4.—6. aŭg. antaŭ la forveturo al Helsinko. Aliĝu kaj venu multnombre. Subtenu nin en nia malfacila tasko. Informojn volonte donas k-do Kurt Klaps-Kako, sekret. de warboficejo, Freistadt Danzig, Karpenfens.

Laboristaj gimnastikistoj kaj sportuloj, partoprenontaj la tutgermanan gimnastik-kaj sportfeston de la laboristaro en Leipzig la 22—25an de julio 1922 sin anoncu al »Laborista Esperanta Grupo Leipzig«. Oni adresu: K-do J. Münch, Leipzig, Kapellenstr. 8, II., Germanio.

La urbeŝtraro de Plzeň subtenis la vojaĝon de nia delegito al Helsinko per subvencio kaj samtempe ĝi permesis, ke li salutu la XIV. kongreson en la nomo de la urbeŝtraro.

Kara gasto de L. L. E. en Plzeň estis dum kelkaj tagoj s-o Arthur Whitham el Burnley (Anglujo), kiu per siaj rakontoj entuziasmigis la membrojn al la nova laboro.

Sekcio Doubravka apud Plzeň malfermis la 20an de junio en la loka lernejo novan esp. kurson. Partoprenas 16 gelernantoj sub gvidado de k-do Karel Kovanda.

Sekcio en Letná ap. Plzeň pretigis sur frontono de unu domo staranta proksime de fervojo grandegan esp. stelon kun surskribo »Lernu Esperanton!« (ankaŭ ĉeĥe) kaj kun atentigo, kie oni povas ricevi informojn pri esperanto. La vojaĝantoj inter Praha kaj Plzeň estas tiel informataj pri nia lingvo.

Nekrologo. 27an de majo 1922 subite mortis k-do Frant. Hovorka, 25jara membro de L. L. E., sekcio Plzeň I., frato de nia kasisto. Li estis unu el niaj fervoraj membroj kaj entuziasma batalanto por nia afero. Eĉ en lastaj horoj li ne forgesis esperanton kaj ofte parolis pri nia grava ideo. La ligo esprimas al lia maljuna patrineto kaj al la gefiloj profundan kondolencon.

ALIĜU AL U. E. A.!!

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. 10. Presis laborista presejo, Plzeň.

